

NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

ÉSZAKMAGYARORSZÁGI HÍR

**A „Király Lajos” Eszperantó Baráti Kör Tájékoztatója
Miskolc**

2007. november
Novembro 2007.

NOVEMBER	3
A MISKOLC-TAPOLCAI BARLANGFÜRDŐ	4
NOVEMBRO	11
LA GROTOBANEJO DE MISKOLC-TAPOLCA	11
(La Lago-groto kaj ties bancelaj establaĵoj)	11
Parto I	11
KOREKTO	18
GYERMEKSZÁJ	19
INFANBUŜO	19
HÍREK	19
FAMOJ	20
CENTJARIĜO DE LA RUMANIA ESPERANTO-ASOCIO	20
OKTOBRAJ EVENTOJ	22
A vadász elvérzett	28
LA ĈASISTO ELSANGADIS	28
INVITO	29
VARBÓ - FALUMÚZEUM	30
Kakukkfű, gyönyörű	30
VILAĜMUZEO EN VARBÓ	31
TIMIAN', BELEGA	31
ĈINA HUMURAĴO	33
Rendevuo	33
TENDARA VESPERO	36
Dr. Zajác Magdolna	37
VILÁGHÍRŰ SZEMÉSZEK, AKIK NEM A SZEMÉSZETI TEVÉKENYSÉGÜKÉRT LETTEK HÍRESEK	37
Sir Arthur Conan Doyle	37
Ludwig Lazarus Zamenhof	39
D-RINO MAGDALENA ZAJÁCZ	42
MONDFAMAJ OKULKURACISTOJ, KIUJ FAMIĜIS NE PRO SIAJ OKULMEDICINAJ AGADOJ	42
SIR ARTHUR CONAN DOYLE	43
LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF	44
GRAVAJ DECIDOJ EN POLLANDO	47
KONDOLENCO	48

NOVEMBER

MAGYARORSZÁGI KIRÁNDULÁSOK

Kedves Olvasóink!

Mi sem szebb egy őszi kirándulásnál! A természet ezernyi színe varázslatos! A napos, szél és esőmentes idők alkalmasak kirándulni. Most azonban, a régióink olyan helyét ajánljuk felkeresni, mely az év minden évszakában látogatható és egyformán feledhetetlen élményt nyújt. És vajon miért? Kedvesinálónak – kérjük – olvassák el a következő ismertetőt a Miskolc-Tapolcai Barlangfürdőről.



A MISKOLC-TAPOLCAI BARLANGFÜRDŐ (A Tavas-barlang és fürdési célú létesítményei)

(Kézirat)

dr. Lénárt László

I. rész

Általános ismertetés

A Barlangfürdő Északkelet-Magyarország gyönyörű, turisztikai látnivalókban is gazdag környezetében, Miskolc város üdülőterületén, Miskolc-Tapolcán található. A régió turisztikai gazdagságát az Európában egyedülálló Barlangfürdőn kívül olyan nevek jelzik, mint Hajdúszoboszló, Mezőkövesd (gyógyfürdők), Aggtelek (barlang), Tokaj és Eger (bor) Hortobágy (puszta), Mátra, Bükk, Zemplén (hegyek, erdők, vadászat) stb.

Miskolc a honfoglalás korában létrejött település, mely ma már 192.000 fős nagyváros, ennek megfelelő történelmi emlékekkel, infrastruktúrával, kulturális hagyományokkal és eseményekkel, oktatási és tudományos háttérrel (Miskolci Egyetem). A nagyváros közvetlen szomszédságában (a városközponttól 7 km-re) található Miskolc-Tapolca üdülőhely, különleges mikroklímájával, helyi jelentőségű, védett parkjával, csónakázó tóval, s a gyógyhatású termásvíz vájta természetes üregek feltárásaira megépült Barlangfürdővel. A üdülőhelyen közel 7 hektáros területű strandfürdő (4500 m²-es vízfelülettel) is a nyári pihenését, szórakozását biztosítja az évente több százezer Miskolc-Tapolcára látogatónak.

A városból gépkocsival, helyi autóbusz járattal és ma már kiépített kerékpárúton is eljuthatunk Miskolc-Tapolcára. Külön kiemelő, hogy ezt az utat a Hejő-patak mentén gyalog, futva vagy kocogva is megtehetjük.

Miskolc-Tapolca központja (a park, a fürdők, a csónakázó tó és a vízmű) köré szállodák, panziók, vendéglátóhelyek, üdülők és lakások épültek.

A hely igazi értéke az előbbieken említett három elem, melyet a már megfogalmazott idegenforgalmi fejlesztési stratégiában összefoglalóan a "vizek völgyének" neveznek. A távlati fejlesztési koncepcióban ehhez kapcsolódik egy új terület, a Barlangfürdőt magába foglaló Vár-hegy nyugati oldalán található, művelésből kivont kőbánya, melyet a "kövek völgyeként" említenek.

A terület igazi kincse a Barlangfürdővé kialakított Tavas-barlang, melyet a víz évezredekken át vájt ki a kemény mészkösziklákból. Bár a Barlangfürdő alapjául szolgáló Tavas-barlangot már az ősember is ismerte, első írásos említését 1936-ban Kerekes [6] tollából olvashatjuk, Barlangfürdővé való átalakítására hosszú előkészítő munka után csak 1959-ben került sor. Ebben az Európában egyedülálló adottságú Miskolc-Tapolcai Barlangfürdőben páratlan élmény a természet fedett uszodájában a hegy mélyéről fakadó kellemes hőmérsékletű termásvízben úszni, fürödni, élvezni a tiszta, minden szennyeződéstől mentes levegőt. Sokan

esküsznek gyógyhatására is, ami elsősorban a kellemes, gyógyító barlangi klímájának, valamint a meleg karsztvizének köszönhető.

Ez a termásvíz nem olyan tömény, mint egyes gyógyvizek (a fürdőegyüttesben felhasznált termásvíz összes sótartalma nem éri el az 1000 mg/l-t sem) és sokan éppen ezért kedvelik. Ebben a vízben ugyanis - szemben az egyes sokkal töményebb gyógyvizekkel - korlátlan ideig lehet fürödni, úszkálni, ki lehet próbálni a pompás dögönyözőt és a többi vízi attrakciót. Ezek most tovább bővülnek és gazdagodnak: a sokak által ismert barlangi medencéhez újonnan kialakított tárószakaszok, frissen feltárt természetes járatok és termek kapcsolódnak. A "Gömb terem" a vidám meglepetések kedvelőit várja, mellette pedig egy óriási pezsgőfürdőben víz alatti vízsugarak masszírozzák a vendégeket. Kissé távolabb egy rejtett szerkezet mozgatta "föld alatti folyó" vízáramával szemben - vagy éppen annak segítségével - juthatunk a legrégebben feltárt, legszebb barlangi szakasz fürdőmedencéjébe.

A Barlangfürdőben azonban nem kell lemondanunk a szabadban történő fürdőzésről, a tapolcai park látványáról sem: míg a barlang a természet mesterei alkotása, addig a tavi medencék és a fölé hajló könnyed és elegáns kagylótető az emberi alkotóképességet dicséri.

A Barlangfürdőben nincs téli és nyári szezon. A barlangjáratokban örök tavasz van, legyen a külszínen rekkenő hőség avagy csikorgó fagy.

A külső medencékben (a Kagyló alatt) a meleg termásvíz oltalmából élvezhetjük a havon szikrázó téli napsütést (hátsó címlap, lent), nyáron a szabadban állnak a napozóágyak, s a déli hőség elől kínálnak felüdülést (hátsó címlap, fent) a barlangjáratok. A fürdőzés kiegészíthető szaunázással, illetve egyéni gyógykezeléssel is. A páratlan mikroklíma, a tiszta, kék víz, a látvány és az egyedi terápiák után egyre többen távoznak felfrissülten és gyógyultan a Barlangfürdőből, hogy másoknak is elmondhassák: ez egy csoda ...



A Kagyló

A Bükki karsztrendszer és Miskolc-Tapolca jelentősége Miskolc vízellátásában

Miskolc-Tapolca vízellátási szempontból is meghatározó szerepet tölt be Miskolc életében. Nem csak mint pihenőcentrum fontos, de az itt fakadó hideg karsztforrások foglalásával biztosítják Miskolc város ivóvízellátásának 50 %-át, ami 1998-ban havonta 950.000 m³ (naponta átlagosan 31.000 m³-nyi) tiszta, egészséges, rendkívül jó ízű ivóvizet jelent.

A legbővizűbb karsztforrások általában a Bükk peremén fakadnak. Ezek közül az egyik legnagyobb a Miskolc-Tapolcán lévő egykori hidegvízű forráscsoport, mely ma szivattyúzott karsztforrásként (Új-kút, előtte Olasz-kút, melybe szivornyával több kisebb forrás vizét is bevezették) adja le vizét. A forrás túlfolyójának szintje - melyet az utóbbi években több alkalommal is tartósan elért, azaz ekkor volt szabadon kifolyó vízhozam - 126 m-el van magasabban a tengerszintnél. (Annak ellenére, hogy a forrás foglalása miatt innen túlfolyó víz ritkán van, a Hejő-patak ma is aktív a parkban, a tóban fakadó források, ill. a völgyön lefutó vizek miatt.)

Az összes többi Miskolc környéki számot tevő, vízellátási célokra foglalt karsztforrás fakadási szintje ezen kilépési szint felett van. Ezek közül a Tavi-forrás 7500 m³, a Szent György-forrás 600 m³, az Anna-mésztufabarlangban mésztufából és dolomitből fakadó Anna-forráscsoport 4000 m³, a Szinva-fő-forrás 11.000 m³, a Szinva-felső-forrás 1000 m³, a Felső-forrás 900 m³, a Garadna-forrás 13 m³, a Király-kút 400 m³ ivóvizet ad naponta átlagosan Miskolc városának. (A közölt sokévi átlagértékekből az is sejthető, hogy jelentős mennyiségű, szabadon elfolyó vize - mindig aktív patakja - a jelzett források közül csak a Garadna-forrásnak van, a többieknek csak időnként.)

Miskolc-Tapolca igen jelentős - ma már egyetlen - melegforrása a Barlangfürdőben lévő Termál-forrás, mely kalcium-magnézium-hidrogénkarbonátos, langyos vízű, időnként felszínig felemelkedő karsztforrás. Vízhőmérséklete 24-31 oC között ingadozik, de átlagban 30 oC-al lehet számolni. vízminőségének jellemzésére az alábbi - jellemzőnek tekinthető - elemzési eredményeket mutatjuk be:

Általános jellemzők	pH:	7,1
	vezetőképesség:	570 µS/cm
	kémiai oxigénigény:	0,7 mg/l
	karbonát keménység:	180 mg CaO/l
	összes keménység:	183 mg CaO/l
	szabad széndioxid:	75 mg/l
	oldott oxigén:	3,3 mg/l
Anionok	hidrogénkarbonát:	396 mg/l
	szulfát:	27 mg/l
	klorid:	8 mg/l
	nitrát:	1,3 mg/l
	nitrit:	0,00 mg/l
Kationok	kalcium:	113 mg/l
	magnézium:	11,4 mg/l
	nátrium:	9,7 mg/l
	kálium:	2,5 mg/l
	mangán:	0,00 mg/l
	vas:	0,00 mg/l
Nyomelemek	jodid:	0,005 mg/l
	bromid:	0,05 mg/l
	fluorid:	0,17 mg/l

Vízkielépési szintje kissé az Új-kút vízkielépési szintje felett van. Átlagos, szivattyúzott napi hozama 1300 m³, melynek túlnyomó többsége a Barlangfürdő vízellátását biztosítja. (Valamikor a langyos vizű források is több helyen törtek fel a Barlangfürdőben és az előtte lévő területen, de a foglalás során ezek megszüntek. Ezzel szemben a Barlangfürdő mögött húzóódó tárórendszerben több helyen elérték a vízszintet, melyben 22 °C körüli hőmérsékletű langyos, ill. 12 °C körüli hideg vizeket találtak.)

Miskolc város fürdővíz ellátásában a forrásfoglalásokon kívül mélyfúrású kutak is részt vesznek. Ezek 40 °C-os, vagy annál is melegebb vizet szolgáltatnak, összesen napi 4400 m³-nyi mennyiségben. Ezek ugyanabból a rétegből nyerik vizüket mint a Termál-forrás, csak mélyebbről, ezért melegebbek és magasabb a sótartalmuk.

Természetesen nem csak Miskolc használja a Bükk hegység vizét, hanem a bükki települések és a Bükk környeztében lévő mintegy 80 város és község. Ezek részben forrásfoglalásokon keresztül befoglalt forrásokat jelentenek Kács és Sály (összesen 5000 m³ napi átlaghozammal), Belpátfalva, Mónosbél és Szilvásvárad (összesen 2800 m³ napi átlaghozammal) térségében, valamint zömében melegvizű és langyos vizű fűtő kutakat Eger, Mezőkövesd, Bogács, Felsőtárkány, Egerszalók térségében mintegy 20.000 m³ napi átlaghozammal. A Bükk É-i részén fakadó nagyobb források egy része egy-egy kisebb település teljes vízellátását úgy biztosítja (pl. a mályinkai Tó-forrás a maga napi 40 m³-ével), hogy túlfolyó vize is marad. Ezen túlmenően a Lázberci-tározó teljes vízutánpótlását is a Bükk É-i részén lévő nagy karsztforrások biztosítják, így azt mondhatjuk, hogy a Bükk részben vagy teljes egészében mintegy 400.000 embernek ad folyamatosan jó minőségű, tiszta és egészséges ivóvizet.

A források és mélyfúrású kutak vizét a Bükk gyomrában tározott csapadékeredetű karsztvíz biztosítja. Ennek a karsztvíztömegnek a legmagasabb pontja általában a Nagymező alatt található mintegy 250 m-el a felszín alatt, kb. 530 m tengerszint feletti magasságban.

A karsztvízszint ingadozása igen jelentős, a Nagymező alatt az utóbbi 7 esztendőben mintegy 20 m volt, de pl. Répáshuta környékén 70 m-t is meghaladó vízszintváltozásokat tapasztaltunk, valamint van irodalmi adatunk a 100 m-t meghaladó barlangi karsztvízszint változásokra is.

Ezt a nagymennyiségű karsztvizet - melynek alsó felületét több száz, ill. bizonyos esetekben több ezer méter mélységben lehet meghatározni - az egykor hullott csapadék biztosítja. A források fakadási szintje alól csak a meleg és langyos vizek bukkannak a felszínre, ill. a felszín közelébe, hideg karsztvizek esetében csak a pillanatnyi csapadékból keletkező leszivárgó vizekkel lehet számolni.

Emiatt, ha 3-5 hónapig nem hull számot tévő csapadék, akkor az komoly vízhiányt okoz a hegységben, illetve Miskolcon, valamint a környező településeken. Ez azt jelenti, hogy a felszínre kilépő források hozama jelentősen lecsökken - adott esetben ki is száradnak források -, valamint a víztermelő létesítményekből is jelentősen kevesebb vizet lehet kiemelni, s azt is nagyobb mélységből. Ma, az utóbbi 30 évet figyelembe véve, mintegy 700 mm-es átlagos évi csapadékmagassággal, illetve az ebből származó átlagosan közelítően 160 millió m³ évente megújuló víztömeggel lehet számolni a Bükk teljes felületére vonatkoztatva. Ennek a víztömegnek mintegy harmada jut le a karsztvízszintig, s onnan mozog a források, ill. vízkivételi helyek felé. A karsztvízszintig lejutó vízmennyiségnek mintegy a fele - az utóbbi években kb. 26 millió m³ évente - a társadalmi vízforgáson keresztül jut vissza a természetbe,

a másik része viszont közvetlenül, mint ökológiai vízkészlet hasznosul források, patakok, tocsogós helyek formájában.

A Miskolc-Tapolcai Tavas-barlang formakincse

A Miskolc-Tapolcai Tavas-barlangról az első szakmai leírást (mint Görömbölytapolcai Tavasbarlangról) Kerekestől [6] olvashattuk 1936-ban, aki így ír róla: "Miskolctól DNy-ra, a Bükk NyÉNy-KDK-i peremi termális törésvonala mentén érintkezik az alaphegység ... a harmadkori medenceüledékekkel. A törés mentén szállnak a felszínre Tapolcafürdő meleg forrásai, ... a Várhegy mészkörögének tövében nyílik a Tavas barlang".

A szerző azt is megemlítette, hogy a barlangot előtte már Sebős K. térképezte (1931.), de a leírását nem publikálta. Hivatkozik továbbá arra is, hogy 1935-ben egy nagy sziklaomlás a barlangban található víz felületét jelentősen lecsökkentette.

A kb. 230 millió éves triász mészkőben az alulról feltörő meleg vizek sok üreget alakítottak ki az elmúlt évszázadok során a Vár-hegy tömegében korróziós úton, de ezek közül a Várhegy nyugati oldalában az 1891. és kb. az 1936-os évek közötti bányászat sokat megsemmisített, ill. részbeni elpusztítása mellett feltárt. A barlangok-barlangroncsok egy részét csak barlangkutató felszereléssel lehet felkeresni, de sokuk meglátogatása némi kis túra után bárki számára elérhető.

A barlangok közül ma messze a legismertebb a Tavas-barlang, melyet barlangi fürdővé való kiépítése tett az emberek nagy tömege előtt ismertté. (S természetesen az egyszerűség kedvéért át is keresztelték "Barlangfürdő"-vé. Mi a továbbiakban ezt a névváltozatot akkor használjuk, amikor az átalakított formájú, emberi használatra igénybevett Tavas-barlangról beszélünk.)

A Tavas-barlang eredetileg több bejáratot bírt, melyeken keresztül a denevérek nagy tömegei is felkeresték a barlangot, nyilvánvalóan a kellemes hőmérsékletű klímája miatt. (Valószínű, hogy a barlang gyógyító levegőjét ők már az ember - az ősember - megjelenése előtt is élvezték ...)

Bár a nagy tömegek előtt ismert barlangban cseppkövek, mészkiválások eredetileg is csak elvétve fordultak elő, az alulról felfelé fejlődő, gömbüstös, gömbüstsoros kürtői fantasztikusan szép látványt nyújtanak, főleg a kellemes fürdővízben háton lebegve. A csak a barlangászok által ismert részekben viszont bekérgezések, cseppkövek, nagy kristályok és főleg borsókövek is megtalálhatók, ill. a Barlangfürdő működése miatt többféle mészképződmény kiválást is lehet tapasztalni a jól ismert részeken.

A II. világháború után először Borbély S. [1] írt a barlangról, jelezve azt, hogy az 1935-ös omlás törmelékét a miskolci barlangkutatók (az első szervezett miskolci barlangkutató csoport tagjai, a "miskolci zombolyosok") megpróbálták kitermelni. (Szerinte az 1954-es Kessler H. féle felméréskor a barlangnak jóval nagyobb részében volt víz, mint 1935-ben.) Szólt arról is, hogy szerinte, és a magyar barlangkutatók állásfoglalása szerint, a barlang megérdemelné, hogy abban barlangfürdőt építsenek ki.

A Barlangfürdő kiépítésének története

A napilapokban megjelent híradások után a szaklapokban Kessler H. [7] adott először hírt 1959-ben a Barlangfürdő az évi május 14-i megnyitásáról. A megnyitást nagyon fontosnak tartva szakmai érveket is említett, melyek a létrehozást erősítették. Egyik ilyen, hogy a barlang levegője tisztább, mint a környezetének a levegője, sőt, itt még a Bükk levegőjében található szennyezőanyagnál is kevesebbet találtak. Másik, a barlangban fakadó langyos víz, melynek rádiumemánáció tartalma optimális, azaz a többszörös gyógytényező együttesen hat a látogatókra.

Tőle tudhatjuk meg azt is, hogy a Tavas-barlang talaját kiegyengették s azt gyöngykavicssal leterítették, hogy a víz minél kevesebb akadállyal léphessen be a fürdőtérbe. A barlangba való bejutást megkönnyítendő tárót építettek, és azt, és a barlangot elektromos világítással látták el. A látvány (és a jobb barlangi levegő érdekében) a barlangon belül vízesést hoztak létre. Szerinte a Barlangfürdő (melynek nevét ilyen formában nála olvashatjuk először) a továbbiakban nem csak idegenforgalmi, hanem komoly gyógyászati értékekkel is bír, melynek kiaknázását rendkívül fontos feladatnak tartotta.

A nagyközönség számára is részletesen Nagy L. [14] írt 1960-ban, a Miskolci útikalauzban. Ezt a munkát idézzük kissé részletesebben, hiszen nagyon sok fontos információt tudhatunk meg tőle.

Miskolc-Tapolca, azon belül a Barlangfürdő a Bükk hegység keleti lábánál, erdőséggel borított hegyoldal aljában található. A mészkősziklák geológiai törésvonalak mentén emelkednek a térszín fölé. Ezen törésvonalak mentén részben hideg, részben meleg (langyos) források törtek fel a történelmi idők folyamán, s ezeket az itt lakó emberek a kor adott színvonalán hasznosították. Ezen források együttesen a Hejő-patakot alkották, mely télen sem fagyott be.

A Dimitrov (=Szent Kereszt)-hegyen lévő sziklaüregben (Vértes L. [18] névhasználata szerint a Görömböly-Tapolcai sziklaüregben) Megay G. 1928. és 1931. között végzett ásatásai során megtalálta a jégkorszakbeli ősember csontmaradványát, pattintott kőeszközeit és azon állatok csontjait, melyekre az ősember vadászott. (Ezen üreg és a Tavas-barlang hosszú időn keresztül lakott volt, mivel neolitikori vonaldíszes edénytöredékek is előkerültek a törmelékből.)

A források vizét a középkor táján kezdték gyógyításra használni. Először a szabadban fürödtek, de a XVIII. századból már kőből épült fürdőépületet említenek. 1859-ben és 1869-ben már gyógyfürdőről tesznek említést a leírások.

A mai épületet 1939-ben építették, csak ekkor még a homlokzatára a "Gyógyfürdő" szó volt felírva a "Termálbarlangfürdő" helyett. Természetesen a lényegében változatlan homlokzat mögött sok minden megváltozott azóta, de a lényeg nem: a pihenés, a kikapcsolódás, a gyógyulás ténye egy melegvizű barlangfürdőben vagy a mesterségesen épített termál medencében, esetleg a Kagyló-fürdővé változtatott tavi fürdőben.

Nagy L. [14] a tapolcai bevezetés után a következőket mondja a barlangról: "A termálfürdőből juthatunk be az európai viszonylatban is egyedülálló barlangfürdőbe, amely az évezredek óta feltörő melegvíz által a hegy belsejében kialakított sziklabarlangban 1959-ben létesült. A víz hőfoka 27-31 oC, mélysége körülbelül 130-140 cm. Alját gyöngykavics borítja

... A barlang egyik ágában négy vastag sugárban ömlő, ún. "Dögönyöző" zuhany jótékony, természetes masszázst és felfrissülést nyújt. A barlang levegője kiváló hatású asztmatikus légzőszervi bántalmak ellen. Miskolc-Tapolca fürdő vize egyébként testi és szellemi kimerültség, a vegetatív idegrendszer megbetegedései, a szív működés ideges zavarai, még nem rögzített vérnyomás-emelkedés és ideges eredetű gyomor-bél panaszok esetén hatásos."

A Gyógyfürdő akkor még szerkezetileg is külön volt a Tavi-fürdőtől, melyben szintén 31 oC-os hőmérsékletű volt a fürdővíz, ami a finom kavicsal borított forrástérben bugyogott a felszínre.

Amint látjuk, mind a Gyógyfürdőben (Barlangfürdőben), mind a Tavi-fürdőben a kavicsal kibélelt aljú forrástérben fürödtek az emberek, azaz fennállt a források emberek által történő elszennyezésének veszélye.

A Barlangfürdő életében a következő jelentős dátum 1969-70-ben volt. Ekkor a Barlangfürdőben megszüntették a forrástérben való fürdést és a források vizét elvezették, a forrásszájakra betonfödémeket helyeztek, melyek ma a Barlangfürdő alját jelentik. Az aknában összefogott meleg karsztforrások vizét szivattyúval emelték be a Barlangfürdő egy 12 m magas, egyébként száraz kúrtójába, ahonnan több zuhatagon keresztül jutott a "Dögönyöző"-be s ezen keresztül a barlang kicsempézett medencéjébe.

A barlanggal egybeépült Termál-fürdő medencéit a Barlangfürdőből továbbra is meg lehetett közelíteni. Újdonságként viszont - a régi, megszüntetett Tavi-fürdő helyett - egy kupolás szerkezetű, szabadtéri medencét - a "Kagylót" - alakították ki, melyet a Barlangfürdővel egy e célra készített táróval kötöttek össze. (A Kagyló medencéit viszont a Termál-fürdő felől, a Termál-fürdő céljára létesített épület folyosóján keresztül is meg lehet közelíteni.) Ily módon egy hármass rendeltetésű barlang-, kagyló-, termálfürdő együttest alakítottak ki, ahol egyéb, egyéni gyógyászati szolgáltatásokra (masszázs, tangentor, szauna, stb.) is van lehetőség.

Az 1970-es évek legvégén, az 1980-as évek legelején a Kagyló-fürdő kupolája mögött egy tárot kezdtek hajtani a meglévő barlangrendszerrel Ny-ra, hogy abban újabb, a fürdő bővítéséhez használható föld alatti tereket hozzanak létre. Ezen táró nagy jelentőséggel bír a fürdő további fejlesztésénél.

- Folytatás következik -

NOVEMBRO

HUNGARLANDAJ EKSKURSOJ

Karaj niaj legantoj!

Nenio allogas plie, ol bela aŭtuna ekskurso! La milkoloroj de naturo magias! La sunbrila, senventa, senpluva vetero taŭgas por ekskursi. Sed, nun ni proponas viziti tiun lokon de nia regiono, kiu estas vizitebla en ĉiu jarsezono kaj samforme donas neforgeseblan travivaĵon. Kaj, kial? Por vekti emon – ni petas vin – bonvolu legi la sekvan informon pri la Grotobanejo de Miŝkolc-Tapolca.



LA GROTOBANEJO DE MISKOLC-TAPOLCA (La Lago-groto kaj ties kancelaj establaĵoj)

(Manuskripto)

d-ro László Lénárt
Universitato de Miskolc
Mediomastrumada Instituto
Katedro de Hidro- kaj Inĝeniera geologio
3515 Miskolc-Egyetemváros
gll@uni-miskolc.hu

Parto I

1. Enkonduko

La Grotobanejo troviĝas en la belega NOR-hungaria regiono, riĉa je turismaj vidindaĵoj, en la rekrea areo de urbo Miskolc, nomita Miskolc-Tapolca. La turisman riĉecon krom la - unika en Eŭropo - Grotobanejo indikas tiaj nomoj, kiel Hajdúszoboszló, Mezőkövesd (kuracbanejoj), Aggtelek (grotego), Tokaj kaj Eger (vinoj), Hortobágy (“pusto”), Mátra, Bükk, Zemplén (montaroj, arbaroj, ĉasado) ktp.

2. Miskolc

estas setlejo fondita en la tempo de la hungara landkonkero. Hodiaŭ ĝi estas jam grand'urbo kun 192.000 loĝantoj, infrastrukturo, kulturaj tradicioj kaj eventoj, instrua kaj scienca fono (Universitato de Miskolc).

La rekrea areo Miskolc-Tapolca situas 7 kilometrojn for de la urbocentro. Ĝi havas specialan mikroklimaton, protektatan parkon de loka signifo, lageto por boatado, kaj kun la Grotbanejo konstruita surbaze de la naturaj kavoj kreitaj de saniga termakvo. La preskaŭ 7-hektara plaĝareo (kun 4.500 m² da akvosurfaco) ofertas ripozon kaj amuziĝon al plurcent miloj da vizitantoj poĵare.

El la urbo Miskolc-Tapolca estas alirebla per aŭto, loka aŭtobuso, kaj sur biciklovojo. Tiun vojon, laŭlonge de la rivereto Hejő, oni povas fari ankaŭ perpiede, kurante aŭ kuretante.

3. Miskolc-Tapolca

havas kiel centron la parkon, la banejojn, la lageton por boatado, kaj la akvouzino. Ĉirkaŭ tiuj estas konstruitaj hoteloj, pansioj, gastejoj, rekreejoj kaj loĝejoj.

La vera valoro de la loko estas la kombinaĵo de la menciitaj tri elementoj, kiujn kune oni nomas “*Valo de akvoj*”. Apude, sur la okcidenta deklivo de la Kastelmonto enhavanta la Grotbanejon, troviĝas nova areo, forlasita ŝtonminejo, la “*Valo de ŝtonoj*,”

La ĉefa trezoro estas la *Lago-groto* transformita je *Grotbanejo*, kiun la akvo dum jarmiloj elformis de la malmola kalkoŝtono. Kvankam la Lago-groton konis jam la prahomo, ĝia unua skribita mencio datiĝas el 1936., de la plumo de **Kerekes** [4]. La transformo je Grotbanejo okazis en 1959. En la – unika en Eŭropo – Grotbanejo eksterordinara travivaĵo estas baniĝi, naĝi en la nature kovrita banejo en la interno de la monto, en termakvo de agrabla temperaturo, ĝui la puregan, tute ne poluitan aeron. Multaj vizitintoj estas konvinkitaj ankaŭ pri ties kuraca efiko, dankenda antaŭ ĉio al la agrabla grota klimato kaj la varma karstakvo.

Tiu termakvo ne estas tiom koncentrita, kiel iuj kuracakvoj. La tuta salenhavo de la akvo uzata en la banejaro ne atingas eĉ 1.000 mg/l. Multe da homoj ŝatas ĝin ĝuste pro tio. Nome en tiu akvo oni povas baniĝi, naĝadi dum nelimigita tempo, oni povas ekprovi la bonegan *Masaĝilon* kaj la ceterajn akvajn allogilojn. Tiuj nun estas plilarĝigataj kaj pliriĉigataj. Al la vaste konata baseno aliĝas nove establita galerisekcio, nun malfermitaj naturaj koridoroj kaj salonoj. La *Globa salono* atendas la ŝatantojn de gajaj surprizoj; apude en grandega ŝaŭmbanejo subakvaj akvofaskoj masaĝas la vizitantojn.. Iom pli fore kontraŭ, aŭ helpe de kaŝita mekanismo movanta la akvokurenton de “subtera rivero” oni alvenas al la banbaseno de la plej frue malfermita, plej bela grotosekcio. Tamen oni ne devas rezigni pri subĉiela baniĝo, nek pri la vido de la parko. Dum la groto estas kreaĵo de Naturo, la lagbasenoj kun la malpeza kaj eleganta, konko-forma tegmento atestas pri la kreiveco de Homo.

En la Grotbanejo ne ekzistas vintra kaj somera sezonoj. En la grotkoridoroj regas eterna printempo, eĉ kiam ekstere estas sufoka varmego aŭ severa frostoj.

En la eksteraj basenoj (sub la Konko) oni povas ĝui la vintran sunlumon brilantan sur neĝo (malantaŭa kovrilpaĝo, sube). Somere en la libera aero staras la sunbaniĝlitoj, kaj la grotkoridoroj ofertas refreŝiĝon dum la tagmeza varmego (malantaŭa kovrilpaĝo, supre). La baniĝo kompletigeblas per saŭnado aŭ per individua terapio.. Ĝuinte la senparan mikroklimaton, la puran bluan akvon, la spektaklon kaj la individuan terapion ĉiam pli da vizitantoj forlasis la Grotbanejon refreŝigitaj kaj sanigitaj, por ke ili povu rakonti al aliuloj, ke tio estas vera miraklo.

4. La rolo de la karstsistemo de Bükk montaro kaj de Miskolc-Tapolca por la akvoprovizado de Miskolc

La rolo de Miskolc-Tapolca estas decida por la akvoprovizado de la urbo. La “kaptitaj” malvarmaj fontoj liveras la duonon de la akvoprovizo de urbo Miskolc. Tio signifis en 1998 950 000 m³ da pura, sana, altkvalita trinkakvo po monato (meze 31.000 m³ po tago).

La plej akvo-abundaj karstaj fontoj troviĝas rande de la montaro Bükk. Pleje gravas la grupo de malvarmakvaj fontoj de Miskolc-Tapolca. Nun tiu donas akvon nur per pumpado. La nivelo de trafluo de la fontoj situas je 126 metroj super la marnivelo. (Malgraŭ tio, ke trofluanta akvo malofte aperas en la “kaptita” fontogrupo, la rivereto Hejó eĉ hodiaŭ estas aktiva en la parko, pro la fontoj troviĝantaj en la lago kaj pro la akvofluo en la valo.) La elnivelo de ĉiuj ceteraj karst-fontoj de la ĉirkaŭaĵo de Miskolc kaptitaj por akvoprovizado estas pli alte ol tio.

La sola varmakva fonto de Miskolc-Tapolca estas la *Terma fonto*, troviĝanta en la Grotbanejo. Ties akvo ests varmeta, de tempo al tempo leviĝanta ĝis la surfaco, kalcimagnezi-hidrokarbonata. Ĝia temperaturo fluktuas inter 24 kaj 31 °C, meze 30 °C. La karakterizaj indikoj de la akvo estas jenaj.

Tabelo 1

pH	7,1
konduktiveco	570 µS/cm
kemia oksigenbezono	0,7 mg/l
karbonata malmoleco	180 mg CaO/l
tuta malmoleco	183 mg/CaO/l
libera karbondioksido	75 mg/l
solvita oksigeno	3,3 mg/l
Anjonoj	
hidrogenkarbonato	396 mg/l
sulfato	27
klorido	8
nitrato	1,3
nitrito	0,00
Katjonoj	
kalcio	113 mg/l
magnezio	11,4
natrio	9,7
kalio	2,5
mangano	0,00
fero	0,00
Anjonoj de mikroelementoj	
jodido	0,005 mg/l
bromido	0,05
fluorido	0,17

La elira nivelo est iom pli alte ol tiu de la *Nova puto*. La meza pompita kvanto po tago estas 1300 m³, kies plejparto servas la akvoprovizadon de la Grotbanejo.

Al la akvoprovizado de la urbo Miskolc kontribuas ankaŭ boritaj putoj. Tiuj liveras entute 4400 m³ da akvo po tago, kies temperaturo estas 40 °C aŭ iom pli. Ili ĉerpas akvon el la sama akvejo, el kiu la Terma fonto, nur el iom pli granda profundo. Pro tio ilia akvo estas pli varma kaj pli saleca.

Kompreneble ne nur Miskolc uzas la akvon de la montaro Bükk, sed ankaŭ la setlejoj situantaj en la montaro mem, kaj ĉ. 80 urboj kaj vilaĝoj de ties ĉirkaŭaĵo. Temas pri kaptitaj fontoj ĉe Kács kaj Sály (entute 5000 m³ po tago), ĉe Bélapátfalva, Mónosbél kaj Szilvássvár (entute 2800 m³ po tago), krome pri plejparte varmakvaj aŭ varmet-akvaj boritaj putoj ĉe Eger, Mezökövesd, Bogács, Felsőtárkány kaj Egerszalók, entute ĉ. 20.000 m³ po tago.

Kelkaj relative grandaj fontoj troviĝantaj en la norda parto de la montaro Bükk provizas komplete po unu eta setlejo (ekz. la *Lago-fonto* de Mályinka, per 40 m³ /tago, tiamaniere, ke eĉ restas superflua akvo. Ankaŭ la artefaritan *akvorezervujon de Lázberc* provizas komplete la abund-akvaj karstaj fontoj de la norda Bükk.

Sume, la karstakvo-sistemo de Bükk montaro kontinue provizas per altkvalita, pura kaj sana trinkakvo ĉ. 400 mil homojn.

La akvo de la fontoj kaj de la boritaj putoj venas el la karstakvo, siaparte devenante el precipitaĵoj, kaj situanta en la interno de la montaro. Ties plej supra punkto troviĝas sub *Nagymező* (“Granda kampo”), je ĉ. 250 metroj sub la tersurfaco, je ĉ 530 metroj super la marnivelo.

La fluktuo de la nivelo de la karstakvo estas konsiderinda. Sub *Nagymező* dum la lastaj 7 jaroj ĝi estis ĉ. 20 metroj, sed ekzemple ĉe Répáshuta pli ol 70 metroj.

Tiun grandegan kvanton de karstakvo liveras la iamaj precipitaĵoj. De sub la elirnivelo de la fontoj nur varmaj kaj varmetaj akvoj fontas. En la kazo de malvarmaj karstakvoj oni devas kalkuli nur pri la subenfiltriĝintaj akvoj devenantaj el la aktuala precipitaĵo.

Do, se dum 3-5 monatoj ne falas konvena kvanto de precipitaĵo, rezultas serioza manko de akvo. Tio signifas ke la akvofluso de la fontoj reduktiĝas; iuj fontoj tute sekiĝas, kaj el la akvoprovizaj objektoj oni povas ĉerpi nur tro etan kvanton de akvo, kaj eĉ tion el pli granda profundo.

Nun konsiderante la lastajn jarojn, por la tuta areo de la montaro Bükk oni povas kalkuli kun meze 700 milimetroj da precipitaĵo, respektive kun renoviĝanta akvo-amaso de 160 milionoj da m³/jaro. Ties unu triono atingas la karstakvo-nivelon kaj el tie moviĝas direkte al la fontoj kaj putoj, La duono de tiu triono – dum la lastaj jaroj ĉ. 26 milionoj da m³/jaro returnas al la naturo tra la socia akvocirkulado. La alia duono servas senpere, kiel ekologia akvoprovizo, forme de fontoj, riveretoj, plaŭdvadejoj.

5. Formaro de la Lago-groto de Miskolc-Tapolca

La unua faka priskribo de la *Laga groto* estis tiu de **Kerekes [6]** en 1936. Li ankoraŭ uzis la nomon *Laga groto de Görömbölytapolca*. Li skribis:

“Sudokcidente de Miskolc laŭlonge de la OkNOK-OrSOR direktita randa terma romplinio de Bükk montaro, la bazmontaro kontaktiĝas kun la terciaraj lagaj sedimentoj. Laŭlonge de tiu romplinio supreniĝas al la surfaco la varmaj fontoj de Tapolcafürdő...ĉe piedo de la kalkoŝtona bloko nomata Várhegy (Kastelmonto) malfermiĝas la Laga groto.”

La aŭtoro mencias, ke pli frue **K. Sebős [1931]** jam mapis la groton, sed ne publikigis ĝian priskribon. Krome li rakontas ke en 1935 disfalo de ŝtonoj konsiderinde reduktis la areon de la akvo troviĝanta en la groto.

Dum la pasintaj centoj da jarmiloj la supreniĝantaj varmaj akvoj kreis per korodo multajn kavojn en la rokamaso de Várhegy (Kastelmonto). El tiuj la minado farita inter la jaroj 1891 kaj 1936 neniiĝis multajn troviĝintajn en la okcidenta flanko de la Kastelmonto. Parton de la kavernoj oni povas viziti nur profesie ekipite por grotesploro, sed multaj estas senprobleme alireblaj por iu ajn, je prezo de ioma subtera marŝado.

La plej konata estas la *Lago-groto*, dank'al tio, ke ĝi estas transformita je *Grotbanejo*. (Ĉi-lastan nomon ni uzas tiam, kiam temas pri la pro homa uzo transformita Lago-groto.)

La Lago-groto originale havis plurajn enirejojn, tra kiuj ankaŭ aroj da vespertoj enloĝiĝis, evidente pro la agrabla temperaturo garantiita per la mikroklimato de la groto.

En la groto konata de la publiko stalaktitoj kaj kalkaj enkrustiĝoj estis eĉ originale tre raraj. Sed la sferujaraj “kamentuboj”, kiuj formiĝas de malsupre supren, aspektas bele, speciale se oni admiras ilin flotante surdorse en la agrabla banakvo.

Menciindas, ke en tiuj partoj de la groto, kiujn konas nur la speleologoj (grotesploristoj), troviĝas enkrustiĝoj, stalaktitoj, grandaj kristaloj, kaj precipe pizolitoj (“pizo-ŝtonetoj”).

Pro la funkciado de la Grotbanejo vari-tipaj precipitaĵoj de CaCO₃ estas observeblaj en la bone konataj partoj.

Post la dua mondmilito **S. Borbély [1]** estis la unu, kiu skribis pri la groto, informante la legantojn pri tio, ke la grotesploristoj de Miskolc (anoj de la unua organizita grupo de speleologoj en Miskolc) provis ekspluati la ŝtonojn de la disfalo okazinta en 1935. Laŭ **S. Borbély** kaj laŭ la ĝenerala opinio de la hungariaj grotesploristoj la groto meritis transformadon je grotbanejo.

6. Historio de konstruado de la grotbanejo

Post informoj aperintaj en la gazetoj, en faka periodaĵo **H. Kessler [7]** raportis kiel la unua pri la malfermo de la *Grotbanejo*, okazinta la 14-an de majo 1959. Li prezentis ankaŭ fakajn argumentojn “pro”:

- (1) La aero de la groto estas pli pura, ol tiu de ĝia ĉirkaŭaĵo; pli pura, ol tiu de la montaro Bükk mem.
- (2) La akvo de la malvarmeta fonto fontanta en la groto entenas optimuman kvanton de radio-emanacio.

Do pluraj sanigaj faktoroj kune efikas al la vizitantoj.

De **Kessler** ni scias ankaŭ tion, ke oni ebenigis la grundon de la Lago-groto, kaj kovris ĝin per ŝtonetaro, por plifaciligi la eniron de la akvo en la banejospacon. Por la vizitantoj oni konstruis flankan galerion kaj instalas elektran lumigadon. Por plibonigi la spektaklon kaj la aeron, oni kreis artefaritan akvofalon. Laŭ **Kessler** la Grotbanejo (ĉi tiun nomon li uzis la unuan fojon) havus ne nur fremdultrafikon valoron, sed ankaŭ terapeŭtikan.

Por la larĝa publiko la Grotbanejon detale priskribis **L. Nagy [14]** en la jaro 1960, en la “*Gvidlibro de Miskolc*”. Tiu verko estu citata iom pli longe.

“Miskolc-Tapolca, kun la Grotbanejo, troviĝas ĉe la orienta piedo de la montaro Bükk, sub arbaro-kovrita montoflanko. La kalkoŝtonaj rokoj elstaras el la surfaco laŭlonge de geologiaj romplinoj. Laŭlonge de tiuj romplinoj fontis parte malvarmaj, parte varmaj (varmetaj) akvoj dum la historiaj tempoj, kaj tiujn la tie loĝantaj homoj utiligis, sur la nivelo de la epoko. Tiuj fontoj kune estigis la rivereton Hejő, kiu ne frostiĝis eĉ en vintro.

En la rokkavo troviĝanta sur la monto Dimitrov (=Sankta Kruco), aŭ laŭ la nomenklature uzata de **L. Vértes [18]** en la rokkavo de Görömböly-Tapolca, **G. Megay** dum siaj elfosadoj faritaj inter 1928 kaj 1931 malkaŝis ostojn kaj ŝtonajn ilojn de la glaciepoka prahomo, kaj ankaŭ la ostojn de la bestoj kiujn li ĉasis. (Tiu kavo, kaj ankaŭ la Lago-groto, estis loĝataj dum longa tempo: en la detrito estis trovitaj fragmentoj de ujoj kun ornamaj linioj karakterizaj por la neolito.)

La akvon de la fontoj oni ekuzis por saniĝo en la mezepoko. Komence oni baniĝis subĉiele. El la 18-a jarcento jam ekzistas skribaj mencioj pri ŝtona banejdomo, kaj en 1859 kaj 1869 – pri kuracbanejo.

La nunan banejdomon oni konstruis en 1939. Malantaŭ la esence neŝanĝita fasado multaj aĵoj estas jam modifitaj, sed la esenco ne: la ripozo, malstreĉiĝo, saniĝo en varmakva grotbanejo aŭ en la artefarite konstruita terma baseno, respektive en la laga banejo transformita je *Konko-banejo*.”

L. Nagy [14] parolas pri la groto jene.

“Ni povas eniri en la grotbanejon -- unikan en Eŭropo -- el la terma banejo. Tio establiĝis en 1959 en la rokkaverno formita dum jarmiloj de la supreniĝanta varma akvo en la interno de la monto. La temperaturo de la akvo estas 27-31 °C, ĝia profundo estas ĉ.130-140 centimetroj. La fundon kovras ŝtonetaro... En unu el la branĉoj de la grotoj la t.n. Masaĝanta duŝo prezentas bonfarantan, naturan masaĝon kaj refreŝiĝon. La aero de la groto bonege efikas al astmaj malsanoj de la spirorganoj. Cetere la akvo de Miskolc-Tapolca estas efika kontraŭ korpa kaj mensa elĉerpiteco, malsanoj de la vegetativa nervosistemo, nervaj misfunkcioj de la koro, ne fiksita plialtiĝo de la sangopremo, kaj nerv-devenaj problemoj de la stomako kaj la intestoj”.

Tiatempe la Kuracbanejo estis laŭstrukturo apartigita de la Laga banejo, kies akvo estis same 31 gradojn varma, fontanta en fontospaco kovrita de etŝtonetaro.

Kaj en la Kuracbanejo (Grotbanejo), kaj en la Laga banejo la gastoj baniĝis en la fontospaco havanta ŝtonetaro-kovritan fundon; tio signifas, ke malpuriĝo estas ebla.

En la vivo de la *Grotbanejo* la sekva grava dato estas 1969-1970. Tiam oni ĉesigis baniĝon en la Grotbanejo kaj forkondukis la akvon de la fontoj. Sur la fontojn oni metis betonajn kovriilojn, kiuj eĉ nun konsistigas la fundon de la Grotbanejo. La akvon de la karstaj fontoj kunigitaj en ŝakto levis per pumpo en la 12 metroj altan, alitempe sekan “kamentubon” de la Grotbanejo. El tie ĝi fluis gravite, tra pluraj akvofaloj, en la *Masaĝilon*, kaj tra tio en la kahelizitan basenon de la groto.

La basenoj de la *Terma banejo* kunkonstruitaj kun la groto restis alireblaj el la *Grotbanejo*. Sed kiel novaĵo, anstataŭ la ĉesigita Lago-banejo estas konstruita kupol-struktura subĉiela baseno, la *Konko*, konektita kun la Grotbanejo per tiucele elkavita galerio (koridoro). La basenoj de la *Konko* estas alireblaj ankaŭ de la *Terma banejo* per koridoro. Tiamaniere estas establita tricela komplekso de grota, konka kaj terma banejoj, en kiŭ ankaŭ individuaj kuracaj servoj estas haveblaj (masaĝo, tangentoro, saŭno ktp.)

Fine de la 1970-aj jaroj kaj komence de la 1980-aj oni komencis kavi galerion okcidente de la funkcia grotsistemo, por aldoni pluajn subterajn ejojn al la banejo.

Klarigendaj terminoj

akvoprovizo vízkészlet
akvoprovizado vízellátás
brekĉio breccsa (szögletes kőzetdarabok természetes összecementezésével létrejött
üledékes kőzet)

(*sedimenta rokaĵo estiĝinta per natura cementado de ne—rondaj*

ŝtoneroj)

dolino töbör (10 – 100 m átmérjű, tál-formájú karsztos mélyedés))

(*plado-forma karsta depreso kun 10- 100 metra diametro*

enkrustiĝo bekérgezés

fisuro, fendo repedés, hasadék

galerio táró (Kőzetben kihajtott vízszintes vágat / folyosó)

(*horizontala elkavaĵo / koridoro en rokaĵo*

globkuvo gömbüst

gutŝtono cseppkő

kalktofo mésztufa (édesvizi mészkő)

(*dolĉakva kalkoŝtono*)

kamentubo kürtő

kaptita fonto foglalt forrás

mezolitiko átmeneti kőkorszak

paleolitiko őskőkorszak

plaŭdvadejo gázló

plenigaĵo kitöltés

precipitaĵo 1. csapadék

2. kiválás

riolita tofo riolittufa (sok szabad kvarcot tartalmazó vulkáni anyag robbanásos
kitöréskor szórt-lehullott

anyagából keletkezett, finomszemcsés kőzet)

(*fajnrajna rokaĵo estiĝinta el dum eksploda vulkana erupto*

disĵetita-terenfalinta,,

kvarco-riĉa materio)

saŭno szauna

sedimento	üledék
ŝakto	akna (függőleges, kútszerű bányavárat) (<i>vertikala, puto-simila elkavaĵo</i>)
ŝtoneto	kavics
tangentoro	tangentor (víz alatt vizsugar-masszázs) (<i>subakva masaĝo per aakvofasko</i>)
tektoniko	tektonika (1. hegyszerszerkezeti mozgások 2. az ezekkel foglalkozó tudomány) (<i>1.. montarstrukturaj moviĝoj 2.ilia scienco</i>)
terciara	harmadidőszaki

Eseon de d-ro László Lénárt, esperantigis kaj la klarigendajn terminojn aldonis d-ro Endre Dudich

- *daŭrigo sekvos* –
☀



La Drakokapoj

KOREKTO

En la aŭgusta numero mi skribis, ke nia fraturbano s-ro Boris Kolker loĝas en Cichago en Usono. Vere, li vivas en Cleveland en Usono. Cleveland estas la ĝemelurbo de Miskolc. Ni petas pardonon pro la misskribo de la loknomo.

Adrienne, s-rino Pásztor

GYERMEKSZÁJ

Egy barátom mesélte el nekem, a vele történt esetet.

„Harmadik gyermekem megszületése után nem sokkal, a sógorom karjára vette a kisbabát, mire három éves kislányom így figyelmeztette:

Vigyázz, el ne ejtsd, mert neked kell helyette másikat csinálni!”

Parkánszkiné Gerő Zsuzsa

INFANBUŬO

Mia amiko rakontis al mi la sekvan okazintaĵon.

„Nelonge post naskiĝo de mia tria infano, mia bofrato surbrakumis nian bebon, kiam mia tri jara filino tiel atentigis lin:

Atentu, ne subfaligu lin, ĉar tiam vi devos fari novan anstataŭ li!”

Esperantigis Suzana Gerő, s-rino Parkánszki


HÍREK

ARANYDIPLOMA

„A budapesti Semmelweis Orvostudományi Egyetem a mai napon (2007.októbar 13) jubileumi arany diplomát adományozott abból az alkalomból, hogy 50 évvel ezelőtt kaptam orvosdoktori diplomát.

Szívélyes üdvözlettel: Dr.Ferenczy Imre

A „Király Lajos „Eszperantó-Baráti Kör szívből gratulál Ferenczy Imre doktor úrnak.



FAMOJ

ORDIPLOMO

La budapesta Medicina Universitato Semmelweis, hodiaŭ donacis al mi jubilean Oran diplomon el tiu okazo, ke antaŭ 50 jaroj mi ricevis kuracistan diplomon.
Kun koraj salutoj: D-ro Imre Ferenczy”

La Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” tutkore gratulas al d-ro Imre Ferenczy.

CENTJARIĜO DE LA RUMANIA ESPERANTO-ASOCIO

Inter la 30-a de agosto kaj la 3-a de septembro 2007 la rumania esperantistaro festis la centjariĝon de la landa Eo-asocio. La eventon organizis EAR kune kun la skolta societo Edelvejso-Cimpulung-Dorna kaj la rumana ILEI-sekcio. Partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj, inter ili ankaŭ eksterlandanoj el Britio, Belgio kaj Nederlando.

La aranĝoj okazis en Vatra Dornei, fama ripoz- kaj kuracloko en la norda Moldavio. La Kulturdomo gastigis ĉiujn aranĝojn. Tie okazis la festa malfermo, la Eo-kursoj, la Tutlanda Simpozio kaj la metiejoj por la gaskoltoj.

Akceptis nin la urbestro, kiu lernis Eo-n antaŭ 40 jaroj. Enirante la Urbodomon, ni ĉiuj gustumis panon kaj salon, lau malnova rumana tradicio, kiu honorigas la gastojn.

La aranĝo komenciĝis kun kurso (Aurora Bute), kadre de la Eo-staĝo, kiu ekzistas de 2006.. La kurso estis interesa kaj starigis debaton pri kelkaj gramatikaĵoj. Samtempe, okazis aparta aranĝo de la gelernantoj, kiuj sekvis kurson, kantis, ludis kaj pentris; gvidis ilin la instruistoj Mihai Trifoi, Emil Crancau kaj Ionel Bodale. La plej belaj pentraĵoj estis premiitaj kaj ĉiuj gelernantoj ricevis memoraĵojn.

La temo de la simpozio estis 100 jaroj de Esperanto en Rumanio. Prelegis pri la historio de la Eo-movado en Rumanio Marian Vochin, kiu okupiĝas pri la temo de dekjaroj, Doru Neagu pri la eko de Eo-movado en Braila kaj Attila Makay pri Oradea, Mihai Trifoi aldonis la proprajn kontribuojn, Aurora Bute rimarkis ke Rumanio malfermiĝis al internaciaj Eo-aranĝoj, Jozefo E. Nagy respondis al la demando Esperanto - ĉu sukceso aŭ fiasko? kaj Marian Constantinescu montris kiel diskonigi Eo-n inter la junuloj.

Kiel kutime, Mihai Trifoi okazigis ILEI-kunvenon, dum kiu li raportis pri la agado de la rumana ILEI-sekcio - kies estro li estas, prezentis la

projektojn FRINGOJ, kiun siaj gelernantoj partoprenis ĉijare en la Kastelo Grezijono, Angela Tellier prezentis sian interesan projekton LINGVOLANĈILO kaj Aurora Bute parolis pri la Novaj ILEI/UEA-ekzamenoj laŭ la Referenckadro de la Konsilio de Eŭropo.

Fine, sed ne laste, okazis Tutlanda Eo-Kongreso, kiam oni prezentis la agadraporton de la asocio kaj de aliaj lokaj Eo-organizoj, la finanĉan raporton, oni elektis novan estraron kaj parolis pri la venonta agado. La nova estraro estas:

Prezidanto: Aurora Bute- respondecas pri tutlandaj Eo-aranĝoj kaj informado

Vicprezidanto: Mihai Trifoi - respondecas pri la lerneja agado

Vicprezidanto: Nicolae Macovei - respondecas pri kulturo kaj turismo

Vicprezidanto: Emil Crâncău - respondecas pri junulara agado

Membro: Mariana Berariu

Ĝenerala sekretario: Popoviciu Ecaterina

Kasisto: Elena Ostoia.

Ne mankis arta programo (lernantinoj de Suceava kantis kaj gelernatoj de Baia Mare dancis), ni vizitis la Etnografian kaj Natursciencan Muzeojn. Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso, oni vizitis famajn monaĥejojn: Moldovita, Sucevita, Voronet kaj Putna.

Eo-aranĝoj okazis por la unua fojo en la norda Moldavio, regiono fama pro la gastemo de la loĝantoj kaj bona konservado de malnovaj tradicioj. La bona rezulto de la aranĝo estas i.a. la sinanonco de tri lernejoj klasoj por studi la lingvon Esperanto en la urbeto Vatra Dornei kaj la preteco de la loka organizanto, instruisto Nicolae Macovei (al kiu ni ŝuldas dankojn pro la grandega organiza laboro), partopreni kun grupo de gelernantoj la projekton FRINGOJ en la Kastelo Grezijono. Aurore Bute

La Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” gratulas kaj al centjariĝo de la Rumania Esperanto-Asocio, kaj al la nova estraro. Ni deziras plian bonsukcesan antaŭeniron pere de entuziasma membraro, kun kiu povos fari multajn elstarajn agojn en intereso de nia kara lingvo Esperanto.

OKTOBRAJ EVENTOJ

Ekspozicio de esperantlingvaj literaturaĵoj kaj pola gasto en Miskolc

Nia malnova kordeziro estis la aranĝo de Eo-libroekspozicio. Sed pro la politika ŝanĝiĝo ni perdis nian senkoston kunvenejon, preleg- kaj ekspozicio eblecojn, apogon en la kulturdomo.

Kiam la kalvinana eklezio rericevis sian posedaĵon - la reformatan gimnazion - al ties biblioteko mia edzo kaj mi donacis 1500 volumojn da libroj, inter ili ankaŭ tridekon da esperantlingvaj. **Sinjoro direktoro Tibor Ábrám** informiĝis pri tio nur en 2006, kiam mia edzo vizitis lin, parolis pri la donacitaj libroj kaj pri la du elstaraj lernantoj de la iama gimnazio, kiuj abiturientiĝis tie **en 1909**. Unu estis d-ro Ludoviko Győry Nagy :mia esperanto-lingvoinstruisto, advokato, la alia estis naskito de Abaujszántó. d-ro Kolomano Kalocsay. Ili estis samklasanoj kaj geamikoj, kiuj post fino de la gimnazio konatiĝis kun la lingvo internacia kaj ellernis ĝin.

La plano de la ekspozicio - je ilia memoro - naskiĝis dum vizito de mia edzo.

Ĝi realiĝis nun **la 15-an de oktobro 2007**.

S-ro Tibor Ábrám la direktoro donis al la inaŭgurfesto 10 minutojn, dum la paŭzo inter du studhoroj. Ni pensis ĝin tro malmulta. Mi petis por inaŭguri la ekspozicion, *d-ron Francisko Jáki, kiu estas kune kun sia edzino d-rino Marianna Legányi: "Kavaliroj de l' Kulturo" kaj „Ambasadoroj de la Paco"*. Do, telefone ni pritraktis, kiel ni agu en tiuj 10 minutoj. En la gimnazio ne estas instruo de nia lingvo internacia kaj laŭ niaj pli frue ricevitaĵoj informoj, ili ne planas ties instruon. Do, kia estu la inaŭguro? Ni komune solvis la demandon. Kunvenis tie 11 plenkreskaj esperantistoj, 9 bazlernejoj el la lernejo 'Komlóstetői', kiuj lernas Esperanton jam tri jarojn kaj estas gelernantoj de E-instruistino Ilona Fedor. Kune kun la aŭskultantaro de la gimnazio, ni estis 57 homoj tie. Ni multe faris dum tiuj 10 minutoj: aŭdiĝis el muzika CD la sonoj de Himno-Esperanto, poste sekvis la salutvortoj de sinjoro direktoro, de miaj kaj de s-ro dro Jáki, krome Marianna Legányi deklamis en sia traduko hungarlingve la poemon - Mi amas Vin - de d-ro Kolomano Kalocsay. Post la rigardo de la ekspozicio, ni regalis salajn kukojn, nigran kafon kaj fruktosukojn al la gastoj. Inter la partoprenantoj estis s-ro Stefano Pál, nia multjara redaktanto samideano, de la estinta fervojista gazeto: Verda Vojo (redaktita kun †s-ro Stefano Temeši), krome s-ino Margareta Evva el urbo Encs. Kaj rigardis la ekspozicion kaj aŭskultis la prelegon ankaŭ s-ro Imre Cséti: sekretario de fervojista esperantista klubo de ebenaĵa urbo Debrecen.

Pro la donacita ebleco ni transdonis mian donaceton al s-ro Tibor Ábrám. Tio konsistis el unu memfarita brodita librokovrilo el felto (sur blankan felton mi brodis orfadenrandan verdan vinberfolion kun la nomo Miskolc kaj la daton 2007), krome Minimumvortaron verkitan de s-ro Géza Kurucz, redaktoro de la junulara gazeto Juna Amiko, kaj pluse esperantigite la kristanan preĝon PATRO NIA. Krom la sinjoro direktoro, ankaŭ geedzoj Jáki ricevis simile broditan librokovrilon kaj la esperantistaj infanoj ricevis donace de mi: broditan paĝindikilon al libro). Ankaŭ ni la aranĝistoj ricevis donacojn de la sinjoro direktoro, reciproke: unu libron pri la Reformata Gimnazio kaj unu CD-on pri belegaj kanto- kaj muziko ĥorprezentoj de la nunaj hungarlandaj kaj Transilvaniaj hungaraj, sikulaj kaj ĉangoaj popolkantoj de la eŭropfama ensemblo Kösöntyű.

Ni ĉiuj estis forte emociiĝantaj en apudeco de nia Esperanto-flago, ĉar inter muroj de la Kalvinana Gimnazio, nun unufoje sonis la Himno de Esperanto.



Bildoj de kaj pri la ekspozicio

La 16-an de oktobro alvenis nia kara pola gasto s-ro Stanislavo Mandrak: eksa prezidanto de PEA, kiu estas leganto de nia elektra gazeto. Li volis ekkoni kaj la geedzojn Pásztor (pro la verko de la gazeto) kaj la miŝkolcajn gesamideanojn kaj la aliajn el Nyíregyháza kaj Egerfarmos. Ni, nome de la miskolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” invitis lin por pasigi du tagojn en nia regiono Nordhungario. S-ro Stanislavo Mandrak havis tranoktejon en la kolegia gastaĉambro (apartamento) apartanenta al la Ref.Gimnazio. En la sama kolegio, en la "kolektada-ĉambro" okazis lia prelego. La kolegio certigis la ekranon al la prelego kun lumbildprojekciad-ebleco.

En la prelego partoprenis multaj el la plenkreskulaj esperantlingvokursaj gelernantoj de sinjorino Maria Busai. Kaj je nia granda ĝojo partoprenis tiun pr. plennombre nia Esperanto-Amika Rondo. Eĉ ambaŭ eventojn partoprenis nia amikino Suzana Gerő sinjorino Parkánszki: movorgana handikapulino. Ŝi nun estas instruata por paŝadi kun kvarpieda apogilo, sed ĝenerale ŝi trafikis per rulseĝo. En la gimnazio, al la unua etaĝa ekspozicio ŝi iris tamen proprapiede. Sed reen jam ne povis veni pro la granda laceco. Du junaj gimnazianoj kunplektite siajn manojn reportis ŝin al la ternivela parto de la gimnazio. Ŝi atingis sian celon, ĉar tre volis rigardi la ekspozicion. Tielmaniere ŝi donis belan ekzemplon: se iu tre volas fari ion, nur „volu voli”! Dum la prelego ni ĉeestis 19. Bedaŭrinde tien multaj esperantistoj jam ne povis alveni, timante pro la nokta malhelo kaj ne tro bonaj trafikeblecoj. Antaŭ la prelego mi laŭtlegis la pli frue alvenintajn salutmesaĝojn de: s-ro d-ro profesoro Endre Dudich, honora prezidanto de HEA kaj honora membro de UEA, de s-ro Ferenc Harnyos de Eo-Radio de Jászberény, kaj de la afrika devena Aŭstralulo: S-ro Jaw Ampomah Badu. Tiu lasta el nia oktobra gazeto informiĝis pri la hungarlanda vizito de lia malnova kaj altestimata konato s-ro Mandrak.




Bildoj pri la prelego de s-ro Mandrak, altestimata eksa prezidanto de PEA

